

# Pola

# Esperantisto

Nro 2

XXXI  
JAROFEBRUARO  
1937Esperantysta  
Polski

---

ELDONANTO WYDAWCA POLLANDA ESPERANTO-DELEGITARO  
REDAKTANTOJ PROF. DR ODO BUJWID — MGR TAD. HODAKOWSKI  
REDAKTORZY

---

APERAS LA 1-an DE ĈIU MONATO. REDAKCIAN MATERIALON ONI PETAS SENDI ĈIS LA 20-a DE  
ĈIU MONATO. LA REDAKCIO ESTAS RAJTIGITA LA 6 DEZONO SANĜI LA TEKSTON DE MANUSKRIPTOJ.

---

## INAŬGURO DE LA IEL-DOMO INTERNACIA ESPERANTO-LIGO ENIRAS SIAN HEJMON.

SABATON posttagmeze, la 12-an de decembro, interrompis la trankvilecon de la angla kamparo, tridek kilometrojn nord-okcidente de Londono, la alveno per ĉiu speco de veturilo, el ĉiuj partoj de Britujo, de sesdeko da Esperantistoj, kunvenintaj por la inaŭguro de la nova Esperanto-Domo en Heronsgate, apud Rickmansworth, kiu de nun estas la centro de nia tutmonda movado.

En la administra oficejo de IEL, la Prezidanto, s-ro Louis Bastien, veninta speciale el Parizo por la soleno, prenis la parolon por diri la jenajn vortojn:

„Hodiaŭ ni inaŭguras la domon, kiun donacis grandanimaj bonfarantoj. Ili volas resti nekonataj de la Esperantistaro; ni respektu ilian deziron.

„Sed mia unua parolo estu danko al ili, je la nomo de ĉiuj samideanoj. Vi povas konstati, kiel bela, komforta, oportuna estas tiu ĉi domo, ĉirkaŭnata de granda, agrabla ĝardeno. Tiu ilia gesto rekte atingis nian koron, ĉar ni komprenis, kiu profunda idealo gvidis ilin; ĝi estas la idealo, kiu kuŝas en la koro de

ĉiu vera esperantisto, kaj tial nia danko estas duobla: danko pro la donacitaĵo, danko pro la sento, kiu instigis ilin. Franca proverbo diras: „La maniero donaci valoras pli ol la donaco mem“; tial la sento, kiu gvidis ilian geston, tuŝas nin ankoraŭ pli ol la gesto mem. Estu certaj, karaj bonfarantoj, ke ni skrupule agos laŭ viaj intencoj, kaj ke tiu ĉi domo estos domo de paca, fruktodona laboro por nia komuna idealo.

„Same kiel animo loĝigas sin en korpon por komenci vivon, nia Centra Organizo ricevas loĝejon en la momento mem, kiam ĝi komencas sian novan vivon. Al tiu loĝejo ni alportos la animon. Ĝi fariĝos la impulsa centro, kiu unuigos la agadon de ĉiuj niaj Landaj Asocioj. En tiu ĉi momento, kiam ni konstatas la nepridubeblajn progresojn, kiujn faras en la publika spirito la ideo pri internacia lingvo, tiu komuna impulso fariĝas pli necesa ol iam ajn. Grandega estas nia tasko. Jam en Parizo oni preparas internacian konferencon pri „Esperanto en la Moderna Vivo“, kiu oka-

zos dum Pentekosto ĉe la Pariza Ekspozicio. Tiu konferenco, kiu jam kunigas — kaj kunigos — fame konatajn personojn, devos porti multajn fruktojn, se ni kapablos ekspluati ĝian atendatan sukceson. Jen unu hela tasko, kiu sin prezentas al ni; ni trovos multajn aliajn okazojn por labori sur internacia kampo, kaj tiamaniere nia Centra Oficejo, kiu ĝis nun ludis tre modestan rolon, fariĝos vere la animo, la centra movilo, kiu puŝos niajn verdajn trupojn al la fina triumfo.

„Kiam ni transportis ĝin de Genevo al Londono, kelkaj timis, ke ĝi perdos la spiriton de la fondinto de ULA kaj de la Majstro mem. Tiu spirito ne apartenas al tiu ĉi aŭ tiu lando; ĝi estas komuna propraĵo de ĉiuj Esperantistoj, en kiu ajn lando ili loĝas. Ĝi povas prosperi en Anglujo tiel bone, kiel aliloke, kaj pruvo estas, ke la Brita Asocio fariĝis unu el niaj plej prosperaj organizoj. Mi estas konvinkita, ke, sub la lerta gvidado de nia Generala Sekretario, s-ro Goldsmith, kiu jam de longe montris sian kapablon, nia Centra Oficejo respondos al la komuna deziro de la Landaj Asocioj.

## ESPERANTO EN GERMANUJO

Laŭ postulo de la polico la Esperantaj organizoj en Germanujo devis ĉesigi la laboron. Tiu decido sendube rezultis el tio, ke en nia lando ekzistis du Esp.-organizoj, kiuj penadis atingi la gloron per tio, ke unu kontraŭbatalis la alian. Unu el ambaŭ eĉ skribis — kiel oni raportis al ni — al diversaj policejoj kaj denunciis la alian, dirante, ke tiu akceptis membrojn, kiuj agis en kontraŭnacia senco. Tute nature la polico devis veni al la rezulto malpernesi la Esp.-organizojn. Kontraŭe la uzado de Esperanto, la portado de la verda stelo, aranĝo de kursoj, ktp. estas permesataj.

KEU ankaŭ estis devigita likvidiĝi. KEU decidis la likvidadon kaj samtempe protestis. Al la ĉefo de la polico en Berlino KEU sendis kopiojn de laŭdaj kaj aprobaj leteroj, ricevitaĵoj de ministerioj kaj aliaj oficialaj institucioj. La polico tute komprenis la gravecon de nia laboro kaj per dekreto de 7. 9. 1936 (Akto S-PP II A 1132/36) permesis la daŭrligon de la laboro.

„Kuraĝon do, karaj samideanoj, kaj ĉiam antaŭen! Ne ĉiuj povas fari gravan donacon; sed ĉiuj povas dediĉi pli-malpli da tempo kaj klopodoj al nia kara afero. Tio estas la plej taŭga maniero respondi al la intencoj de niaj donacintoj!

„Nova epoko komenciĝas por nia movado; ĝi estu grandioza! En tiu ĉi domo laboru, prosperu kaj venku la Internacia Esperanto-Ligo!”

La ĉeestantoj, inter kiuj estis la mal-avaraj donacintoj, eliris en la ĝardenon, kie s-ro Bastien hisis la Verdajn Standardon, esprimante la deziron, ke ĝi ŝvebu tie ĝis la fina triumfo.

Dankon al la Prezidanto esprimis s-ro G. D. Buchanan, Prezidanto de BEA, kaj post paroladetoj de s-roj Blaise, Oliver, Robertson kaj Wadham la kunvenintoj esploris la domon kaj la ĝardenon, kaj ĝuis tion laŭ la gastama aranĝo de gesinjoroj Goldsmith.

Salutajn telegramojn oni ricevis de diversaj grupoj kaj individuoj kaj leterojn de s-ro E. Malmgren, por la propaganda filio de IEL en Stockholmo, kaj de s-ro Teo Jung por la redakcio de la oficialaj gazetoj en Scheveningen.

Ni trege ĝojas pri tiu sukceso kaj kun vera plezuro ni hodiaŭ informas pri tio niajn eksterlandajn amikojn, petante, ke la gazetoj represu nian informon. Ni esperas, ke la samideanoj en la tuta mondo komprenas la gravecon de tiu sukceso. Ni ankaŭ esperas, ke ĉiuj nun subtenos nin per ĉiuj fortoj, ĉar ni tute nature nun devas montri per faktoj, ke la decido de la polico estis prava. Do, amase helpu per kunlaboroj.

Se ni povos montri al la ekonomia ministerio peradojn de multegaj mendoj, oni ŝatos, pralentos kaj certe subtenos nin. Nur per tio ni povos reatingi la perditan teritorion en Germanujo. Estu certaj ke ni agos tute prudente kaj celkonscie. Tamen, le ĉefa afero estas la subteno helpe de eksterlandaj samideanoj.

**Komerclista Esperanto-Unio**

Unuigo por progresigo de ekonomiaj interrilatoj.

Ranf

Dresden-Radebeul direktanto,  
Friedrich August str. 4.



## AL TEKA-anoj

Karaj kunfratoj!

En Varsovio okazos en aŭgusto (7. VIII. — 15. VIII.) 1937 la 29-a Universala Jubilea Kongreso de Esperanto.

La TEKA deziras organizi dum tiu ĉi kongreso kunsidojn, kiuj devas fariĝi multvizitataj kaj reprezentaciaj kunvenoj.

Estas projektataj 3 kunsidoj:

**I-a kunsido kune kun la Internacia Scienca Asocio Esperantista**, kiun partoprenus diversspecaj sciencistoj: inĝenieroj, kemiistoj, ekonomiistoj, juristoj, medicinistoj ktp. Tiu ĉi kunsido celas montri al la invitataj gastoj, membroj de la Registaro kaj scienculoj, la valoron de la Esperanto-Movado por la ĝenerala scienco. Tiun ĉi ideon pri komuna kunveno de ISAE kaj TEKA mi interkonsentis kun la prezidanto de ISAE, prof. d-ro Odo Bujwid.

**II-a kunsido** estus pure **Internacia TEKA-ana**, kie ni preparolus niajn aferojn, la demandon pri Internacia Medicina Revuo, pri vigligo de nia afero en medicinaj rondoj ktp.

**III-a kunsido** estus dediĉita al pure **scienca medleina** programo, kie diverslandaj kolegoj-medicinistoj tuŝus sciencajn, sociajn kaj fakajn medicinajn temojn.

Ĉu ni sukcesos? Kiel ni scias, en la historio de Esperanto medicinistoj de la unua momento marŝas en la unuaj vicoj. Kiu ne konas nomojn de prof. Richet, prof. D' Arsonval, prof. Forel, prof. Calmette, prof. Vierordt, prof. Strauss, prof. Bouchard, prof. Broca, prof. Bergonié, prof. Jameson-Johnston kaj multaj, multaj aliaj mondkonataj famuloj, kiuj aliĝis al la movado kaj laboris kun ni? Kiu ne scias, ke ekz. en Japanujo la TEKA havas filion JEMA—Japana Esperantista Medicina Asocio — al kin apartenas multaj famaj universitataj profesoroj, arde laborantaj por nia ideo (ni citu nur kelkajn: prof. Nishi, prof. Ogata, prof. Asada, prof. Suzuki, prof. Mochizuki, prof. Fujinami, prof. Cucumi k.a.).

Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio estis fondita en 1909 kaj jam en 1910 ĝi havis 625 anojn, landajn konsulojn en 29 landoj kaj reprezentantojn en 114 urboj de la tuta mondo. Nombro grandioza kompare kun aliaj Asocioj.

En **Polujo**, lando de la 29-a Universala Jubilea Kongreso de Esperanto, la

TEKA-movado estas ankaŭ bone disvolvita kaj kalkulas en siaj vicoj eminentajn kuracistojn (prof. Bujwid, prof. Wrzosek, prof. Lubieniecki kelkajn doktorojn Zamenhof, d-ro Blassberg, d-ro Fels kaj aliaj).

Danke al tio ni esperas, ke la TEKA-kunvenoj en Varsovio povos esti bone preparitaj.

La sukceso tamen dependas s le de **partopreno de allandaj kolegoj**, kiuj donus al niaj kunvenoj karakteron de malgrandaj Internaciaj Medicinaj Kongresoj. Nur **diskutado de diversnaciaj** povos konvinki dubulojn pri nia praveco.

Ni do turnas nin al ĉiuj kunfratoj (kuracistoj, farmaciistoj, dentkuracistoj ktp.) kun jenaj petoj:

1) Se nur eble, **alvenu Varsovlon** kaj anoncu tuj Vian ĉeeston en TEKA-kunvenoj.

2) Se nur eble, **preparu prelegon** por unu el la supre menciitaj kunvenoj kaj tuj nin pri tio informu.

3) Bonvolu **konsili al ni**, ĉu aranĝi la TEKA-kunsidojn antaŭ aŭ dum la ĝenerala kongreso?

4) Bonvolu respondi, ĉu dum la scienca TEKA-kunsido **tuŝi unu demandon**, t. e. elekti unu sciencan temon, kiun preparolus 3 referantoj el diversaj landoj (kiel oni ofte aranĝas dum Universalaj Medicinaj Kongresoj, ekz. temon pri „Novajoj en la kankra demando“ aŭ allan). La saman temon referus laŭ siaj vidpunktoj 3 kolegoj-fakuloj: internisto, rentgenologo kaj ĥirurgo.

5) **Ĉu last** al kolegoj liberecon en la elekto de temoj, kiel estis ĝis nun?

6) Ĉu ne prepari **deziresprimon** de la kongreso, prezentotan poste al Registaroj, ekz. pri enkonduko de nia lingvo en Internaciajn Medicinajn Kongresojn kaj en medicinajn ĵurnalojn? Tio havus eble pli firman signifon kaj fariĝus por ni bona propagandilo.

Jen la demandoj, kiujn ni permesas al ni prezenti nun kun espero, ke ĉiu el niaj amikoj bonvolos helpi nin, tuj respondos kaj tiamaniere aldonus sian briketon por nia estonta konstruaĵo.

**Dro W. Róblin**  
Prezidanto de TEKA.

MINUSKA MANTEL, Lwów.

*For la virojn! diras Claudette.*

Cent-sesdek-centimetraĵo ekbruligas cigaredon, kvalito „Je t' aime Madame”, per cejanblua, polurita ungo. Lasta krio de l' modo, klakfrapetas sian flarilon, antaŭhieraŭ novricevitan de profesoro Buida.

La piedeto sur sepcentimetra kalkanumo brunitas „Kokola-on”, ĝoje salutitan genu-kubut-kaj kapskuan dancon.

Voilà Claudette! Claudette, mia amikino. Claudette, virina miraklo, kreita kvazaŭ sur „kuranta rubando”.

Parolas sensupersignan „Transurban”. Jen Claudette! Emanas memstarecon! Claudette, rezervujo de altensiaj energioj.

\* \* \*

Mi ĉestis Telesforan balon en la Jupiterbaro. Tie staris Claudette, ruĝabuŝa, verdhara, bluunga, serpentbukla Claudette. Sorbis rapidglute 240-kalorian Marsifonon. Fingrovokis min al si, montris elektre lumigitan bluan signon, emblemom de supersigna „Transurban”, Mute mi genu - kaj kapskuis 20 sekundojn laŭ suboceana tamburado kaj stratosfera Pikarda transmita koncerto.

Claudette invitis! Sia loĝejo — teknikaĵo — nokta kuŝejo ŝvebpendanta de sur la vitra plafono. (Solida kreaĵo de Fermo „Dormobon”). Rondokula maŝina monstro naskas ĉielarkan lumon, pudrujo transmittas televidadon transmondan.

Fera mano, neone ardanta, etendiĝas el la muro, senŝeligas nin el nia cibelaĵ manteloj; ruliĝanta planko gvidas nin al vitra kaĝo, manĝocambro.

Lerta mano injektas intervejne „Kolorol”, anstataŭiganta la antaŭdiluvan pendantan maĉadon.

Claudette ridas! Eligas gamon, kiu trile saltas supren, ruliĝas petole en la molan tapiŝon. Claudette balanciĝas! Sur la sepcentimetraj kalkanumoj antaŭen — dorsen — flanken... Claudette dancas! Kubut - genu - kaj kapskuis „Kokola-on”, ĝoje salutitan dancon. Emanas memstarecon. Rezervujo de altensiaj energioj! Claudette, bluunga, serpentbukla, altkalkanuma, virina miraklo, kreita kvazaŭ „sur kuranta rubando”.

Voilà Claudette, amikino mia.

\* \* \*

Claudette malamas la virojn... Energie forigas la unuan loĝanton en la pa-

radizo, ripe priŝtelitan de la rozhaŭta Eva. Rebatas atakojn per blankaj porcelanaj maĉiloj, per akraj ungoj purigas la endanĝerigitan terenon.

For la virojn — diras Claudette. Energie forigas la unuan loĝanton en la paradizo, rebatas atakojn, purigas per akraj ungoj la endanĝerigitan terenon.

Si, Claudette, virina miraklo, kreita kvazaŭ sur „kuranta rubando”.

\* \* \*

Delikate: mano tuŝas levilon. Krake pafelsaltas palaj lumoj, fajreroj ŝpruce direktiĝas al gapantaj miaj okuloj. Ekmoviĝas giganta rado. Ekknaras feraj ŝraŭboj, pezkorpaj pistoj spiregas, frotiĝas sible. Ampèra montrilo dancas nerve, signalas elektrajn tensiojn.

Luma rigardo horigas akre en miajn pupilojn. Ie tiktakas horloĝoforma aparato. Anoncas la kreitan miraklon de la nuna jarcento, la mekanikan viron, vivestigitan en la epoko de Claudette - estaĵoj, malamantaj virojn, memstaraj tipoj de tiel nomataj virinoj.

Ekknaras feraj ŝraŭboj. „Omega” servas precize, momente, neŝangeble, senmalice, senkaprice post necesa funkciigo. Eligas ankonesojn, fajrajn flustrojn, feraj lipoj surpremas precize la deziritajn, ŝraŭbe ekmovigitajn kisojn.

Muta mi staras antaŭ la mekanizita amestaĵo. Per ardaĵ okuloj ĝi bore penetras en mian cerbon, kaŭzante angoron, tremon, renversigon. Per montra fingro mi tuŝas la ferajn ripojn — obtuze tintas la ŝraŭboj, risortaj internajoj en la giganta stomako, produktantoj de animlevaj agoj, precizaj, momentaj, neŝangeblaj.

Scivole mi provas ŝirmalfermi la sentenhavan bruston de „Omega”. Delikata ruĝo rimarkiĝas sur la vangoj de Claudette, mia amikino! Delikata ruĝo, ne kuŝanta antaŭe en kosmetikaj miksaĵoj, delikata ruĝo, kiun ankoraŭ ne perdis Claudette - estaĵo, virina tipo de la nuna epoko.

Du hardelikataj dratoj gvidas preter la muron al pordo. Hezite mi alpaŝas. Tiuj du perfidaj dratetoj gvidas al ing. Harold Jackson, la elpensinto, ekmoviginto de fifuŝita mekanikaĵo. Tiuj du dratetoj ebenigas al si kontakte la vo-



jon al du homaj koroj, ekfunkcias precize, momente, senmalice... karesa lipo-  
paro prisigelas, silentigas la batalkrion,  
ungetoj karese tuŝas vizaĝon, dentetoj  
allogas al alproksimiĝo. Graciaj manoj  
plekligas katece ĉirkaŭ la kolon...

HERMINA BERTIG-DATTNER.

## Kelkaj vortoj pri racia kulturo de homa korpo

Kiam Dio decidis krei la unuan virinon, aperis antaŭ Li diablo, proponante al Li uzi por tiu ĉi laboro la ĉefajn elementojn de porcelano, por ke Eva fariĝu blanka kaj rozkolora, glata kaj delikata, kiel porcelano. Bedaŭrinde Dio ne obeis la diablon, sed uzis por kreado de la unua reprezentantino de malforta sekso, la ripon de Adamo. Tial do Eva devas uzadi artajn helprimedojn, se ŝi volas esti blanka kaj rozkolora, glata kaj delikata. Kaj bone estas sciate, ke ĉiu Eva tion volas! Jam nia praaŭvino Eva ruĝigis siajn belajn lipojn per ruĝaj kiel sango, ĉerizoj. Kiel ŝajnas, ankaŭ nia praaŭvo Noe faris konstante riproĉojn al sia edzino, ĉar ŝi ĉiam pririgardis sin en la akvo (ne ekzistis tiam ankoraŭ spegulo) kaj pentris la buŝon per sango de juna ŝafido. Sed pri tio rakontas al ni nur legendo.

En antikva epoko la arto de belfariĝado estis kultivita, same kiel religiaj ceremonioj en temploj, speciale en idolservaj tempoj.

La antikvaj Grekoj, kiel unuaj enkondukis la korpokulturon, kies ĉefa tasko estis perfekta pureco. La popolo, kiu donacis al la homaro tiajn geniajn skulptistojn, kiel Fidjas, Praxiteles, kaj kies verkoj, ekz. „Afrodite“, estiĝis klasika modelo de beleco, komprenis bone la problemon de la higieno kaj kulturo de la korpo, kiu estas nur tiam bela, kiam ĝi estas zorge flegita, kiam ĝi estas sana kaj pura. La metodojn de zorga flegado de la korpo ĉe antikvaj Grekoj renovigis en nunaj tempoj jam hodiaŭ nevivanta kuracisto, dro Karol Ludvig Schleich kaj nomis ilin: „G r e k a h a ŭ t f l e g a d o“.

Perfekta purigado de la korpo estis ĉefa sistemo de la korpokulturo ĉe antikvaj Grekoj kaj Romanoj. La lastaj opinioj, ke la banoj estas ne nur absolute necesa rimedo por homaj vivo kaj sa-

„Omega“ ruliĝas obtuze en angulon. Inter polvo, ratoj, dispremitaj potetoj li ĝapokule songas pri sia estonta gloro, ie... for de l' nuna vivo... plena de amo, kareso, pasio, natura kaj bezono...

no, sed ankaŭ la plej komforta sporto, kvankam oni tiam ankoraŭ la modernan vorton „s p o r t o“ ne konis.

En tiuj famaj banejoj okazadis konferencoj, diskutadoj, tie kunvenadis ĉiutage konatuloj kaj amikoj, tie la plezuro de intelekta interparolo estis kunigita kun refreŝiganta ĝuo de bonega bano kaj postsekvanta saniga masaĝo. Tiuj antikvaj Romanoj sur la kampo de higieno posedis efektive veran vivsaĝecon. Se ili multe da tempo ĉiutage dediĉis al korpokulturado en la banejoj, ili faris tion por siaj sano, pureco kaj plezuro. La tempo, dediĉita al babilado en banejoj estis multfoje pli utile uzita, ol tio okazas ĉe nuntempaj generacioj, kiuj tutajn tagojn pasigas en kafejoj, plenaj de malpura aero, saturita de milionoj da dangeŝaj bakterioj. Modelon de tiu antikva Romano, kiu posedis la senton por higieno kaj kulturo en plej alta grado, reprezentas „a r b i t e r e l e g a n t i a r u m“ P e t r o n i u s, kiun en „Quo Vadis“ tiel grandioze priskribis Henryk Sienkiewicz.

Jaretoj pasis. La tempoj saŭĝiĝis. La intelekta kulturo ĉiam kunigis kun kulturo de Grekoj kaj Romanoj sur kampo de l' arto, filozofio kaj literaturo. Sed interrompita estis la kontakto en mezepoko sur kampo de korpa kulturo kaj higieno por longaj jaroj.

En la epoko de R e n e s a n c o en Italujo regis en oficiala medicino kaj hejme plenkreskinta ĉarlataneco la plej sovaĝaj imagoj kaj superstiĉoj. Tiuj kontrastoj de la „O r a e p o k o“ de Renaskiĝo: sur unu flanko M i c h e l a n g e l o, L e o n a r d o d a V i n c i, R a f f a e l o, T i z i a n o kaj iliaj geniaj verkoj. Sur dua flanko kompleta manko de l' sento por pureco, higieno kaj kulturo de korpo eĉ ĉe tiuj artistoj, kiuj mem la sanan kaj belan korpon de la homo skulptis en blanka marmoro. Historiisto de l' arto Haldane Mac-

fall skribis en sia „Historio de la pentrarto”, ke la fama Michelangelo ricevis leteron de sia patro kun konsilo, ke li „n e n i a m s i n l a v u”. En tiu epoko oni kuracis la homojn per senĉesa ellasado de l' sango al malsanuloj, ĝis kiam kun la lasta gulo eliris ankaŭ la vivo. Tiu manko de la higieno, unu el la plej gravaj elementoj de la vivsaĝeco, kaŭzis la morton de la juna Raffaelo en lia 37-a vivjaro.

Kaj ankaŭ post unu jarcento ne estis pli bone. Kiam la reĝo Ludoviko XIV, kiu regis 72 jarojn, malsaniĝis, kaj la kuracistoj aplikis al li banon, ĉiuj tremis pro timo, ke la bano lin mortigos. Ankaŭ la fama filozofo Gottfried Wilhelm Leibnitz, tiel universala scienculo ankaŭ sur la kampo de medicino, ne niam s i n l a v i s.

La jarcento de l' vaporo kaj elektro revenis al principoj de higieno, kulturo de korpo, revenis al racia flegado de la sano. En la epoko de famaj bakteriologoj, kiel P a s t e u r, Koch, Calmette kaj grandaj kuracistoj, kiel V i r e h o w

kaj P e t t e n k o f e r sekvis en la medicino danke al tiuj kuracistoj, plej meritplenaj bonfarantoj de la homaro, grandega evoluo, kiu daŭras feliĉe ĝis la hodiaŭa tago. En Eŭropo kaj Ameriko samtempe kun kanalizado oni komencis konstrui grandnombre banejojn kaj banĉambrojn.

Proverbo diras, ke pureco estas duono de la sano. La moderna medicino, kaj kun ĝi la bakteriologio, la scienco pri plej malgrandaj organismoj de la naturo, estantaj ofte fonto de epidemioj kaj diversaj malsanoj, pere de higieno, antiseptaj kaj desinpektaj rimedoj instruas kiel profilakti ĉe infektaj malsanoj, aplikas helpajn metodojn por lokalizi kaj sufoki furiozantajn malsanojn aŭ epidemiojn.

Danke al bakteriologio, al racia kulturo de la homa korpo, la danĝero de infektaj malsanoj konsiderinde malgrandiĝis kaj ankaŭ multe da bono sur tiu kampo povas krei la lernejo, scienca literaturo kaj popularaj kuracistaj artikoloj en la gazetaro.

ALIGU AL LA KONGRESO TUJ  
ĜI JA OKAZOS EN BELA POLUJ.

TUJ ALIGANTE AL LA KONGRESO,  
VI MULTE SERVOS AL LA PROGRESO.

## OFICIALA KOMUNIKO

N-o 4.

La Prezidanto de Pola Respubliko prof. d-ro Ignacy Mościcki akceptis la Altan Patronadon de la 20-a Universala Kongreso de Esperanto.

La Honoran Komitaton eniras ĉiuj ministroj, Prezidanto de l' ĉefurbo kaj aliaj altranguloj.

### ADRESO DE LKK:

Warszawa L, str. Chmielna 26, m. 8,  
Tel. 278-55 kaj 278-08. Pola Poŝtĉekkon-  
to: 29 Universala Jubilea Kongreso de  
Esperanto, Warszawa N-o 23.445. Tele-  
gramadreso de la kasisto: Lublipres, War-  
szawa.

### KOTIZOJ.

Bonvolu noti precize niajn kotizojn:

- I. Kongresa kotizo — angl. ŝil. 35.—
- II. Kotizo por familiano — angl. ŝil. 22.—
- III. Kotizo por gejunuloj ĝis 18 jaroj — angl. ŝil. 14.—
- IV. Kotizo por helpkongresanoj (gru-

poj, institucioj, firmaoj, kiuj deziras montri sian simpatian al la kongreso por helpi ties sukceson kaj por ricevi kongresdokumentojn, sed ne sendas reprezentanton) — angl. ŝil. 14.—

### FAVORKOTIZOJ POR FRUPAGANTOJ.

- Ĝis 30 de aprilo 1937. (rabato 20%)
- |                 |                   |
|-----------------|-------------------|
| I. Kotizo ..... | angl. ŝil. 28.—   |
| II. „ .....     | „ „ 17. pencoj 6. |
| III. „ .....    | „ „ 11.—          |
- Ĝis 30 de junio 1937. (rabato 10%)
- |                 |                          |
|-----------------|--------------------------|
| I. Kotizo ..... | angl. ŝil. 31. pencoj 6. |
| II. „ .....     | „ „ 20.—                 |
| III. „ .....    | „ „ 12. pencoj 6.        |



[I angla ŝilingo egalvaloras 11. l. 1937 zl. 1.30].

**Rimarko:** grupoj kaj societoj, pagintaj Koltizon L. rajtas sendi sian reprezentanton.

**Transsendo de la mono** al LKK okazu per poŝtmandato, poŝtĉeko aŭ poŝtgiro je la Pola Poŝtĉekkonto: 29 Universala Jubilea Kongreso de Esperanto, Warszawa N-o 23.445, sed nur el landoj, kiuj havas liberajn kompens-traktatojn kun Polujo.

El Britujo kaj kolonioj oni pagu al Brita Esperanto-Asocio, London W. C., 142 High Holborn.

El Svisujo pagu nur al Banque Nationale Suisse en Zürich, konto „Dettes Polonaises” S-té Zahan, por LKK.

El Argentino kaj Palestino — al Pola Banko: Polska Kasa Opieki.

El Italujo — al Pola Poŝtsparkaso Roma 1/10110.

El Hungarujo — al la kasisto de Hungarlanda Esperanto-Federacio s-ro Augustiny Oszkár, Budapest I, Attila-utea 47.

El aliaj landoj oni povas uzi ankaŭ poŝtĉekkontojn de la kasisto Stefan Lubliner, W. L. P., Waszawa:

Aŭstrio: Wien D 115973; Belgujo: Bruxelles 222461; Ĉeĥoslovakujo: Praha 501385; Danujo: Kopenhavo 24902; Francujo: Paris 110097; Germanujo: Berlin 156660; Jugoslavujo: Beograd 65044; Japanujo: Tokio 32594; Latvujo: Riga 3838; Libera Urbo Danzig: 1542; Luksemburgo: Luxembourg 4593; Nederlando: Den Haag 145532; Svedujo: Stockholm 4375.

## SEKCIOJ.

Jam funkciaj sekvantaj sekcioj:

**PROPAGANDA KAJ GAZETARA.** Gvidanto: red. Adam Uziembło. La Sekcio komencis energian agadon en pola kaj eksterlanda gazetaroj.

**TURISTA KAJ LOĜEJA.** Gvidanto: direktoro en Kabineto de Trafikministro s-ro Bronisław Wyszyński. Ĉiujn turistajn aferojn preparas sub la gvido de la prezidanto de LKK Wyszyński — Societo Turisma de Esperantistoj en Polujo. La Trafikministerio aperigos baldaŭ 12 esperantajn broŝurojn pri diversaj polaj urboj kaj regionoj. Organizata estas komuna pilgrimo al naskiĝurbo de nia Majstro, Białystok, kaj 5 postkongresaj ekskursoj:

a) Varsovio — Poznań — Biskupin (antikvaj elfosaĵoj) — Katowice (karbo-minejoj) — Wisła (Okcidenta Beskidomontaro).

b) Varsovio — Białowieża (mondfama sovaĝa arbarego) — Vilno — Augustów (pitoreskaj lagoj).

c) Varsovio — Gdynia (la plej granda kaj moderna haveno ĉe Balta Maro) — duoninsulo Hel.

d) Varsovio — Kraków — Wieliczka (famaj salminejoj) — Zakopane (Tatra montaro).

e) Varsovio — Lwów (vizitado de famaj naftiterenoj) — Wrochta (Orientaj Karpatoj).

**Rimarko:** ĉiu ekskurso finiĝas en pitoreska somerrestadejo.

**LOĜEJOJ.** La prezoj estas jenaj:

Hoteloj luksaj . . . . . de ŝil. angl. 8, penc. 6 po persono,

Hoteloj I-rangaj . . . . . de ŝil. angl. 7, penc. 6 po persono,

Hoteloj II-rangaj . . . . . de ŝil. angl. 5, penc. 6 po persono,

Turistaj, privataj kaj komunaj lokoj po persono de angl. ŝil. 1 penc. 6 ĝis ŝil. angl. 4 (depende de kvartalo kaj kvalito de ĉambro).

**MANGADO.** Mangado en Polujo estas malkara. Por orientiĝo ni prezentas prezojn en meze bona restoracio:

Matenmango (kafo aŭ teo, ovoj, buterpano) — angl. ŝil. 1.—

Tagmango — angl. ŝil. 1 ĝis angl. ŝil. 2.—

Vespermango — angl. ŝil. 1 ĝis angl. ŝil. 1 penc. 6,

Oni povas tamen bone manĝi por angl. ŝil. 2/2 tage.

Ĉiuj prezoj en hoteloj kaj restoracioj estas en Polujo sen iaj alpagoj, trinkmono ĉiam enkalkulita.

LKK klopodos organizi tre malkaran manĝejon en la Kongresejo mem.

**LITERATURA.** Gvidanto: Julian Tuwim.

Oni projektas aranĝi literaturan konkurson, eldonon de „Ora Libro de Esperanto”, Pola Antologio ktp.

**GRAFIKA KAJ DEKORACIA.** Gvidantoj: Wacław Falkowski, artisto-grafiko, kaj Jakób Wizenberg, inĝeniero-arkitekto. Baldaŭ aperos jubilea glumarko.

**TEATRA.** Gvidanto: Feliks Falkowski, dram-artisto.

La distra parto de LA JUBILEA estas jam preparata. Dum kongresa koncerto plantudos nia eminenta s-ano la konata Chopin-interpretisto, Imre Ungar el Budapeŝt. Dum Interkonatiga Vespere estos prezentata literatura esperanta kabaredo. En tiu Sekcio kunlaboras Jean Forge.

**KURSA.** Gvidanto: Borys Strelezyk.

Amasaj kursoj komenciĝas en februaro. Estas kontraktita konata Cseh-instruisto Tiberio Morariu.

**FAKAJ KONGRESOJ KAJ KUNSIDOJ.** Gvidantoj: Eugenjusz Rytenberg kaj Jan Zawada.

Ĝis nun anocis siajn fakajn kongresojn:

- 1) UABO. Organizigis LKK de Blindula Kongreso konsistanta el: Bronisław Wyszyński, majoro Edwin Wagner, parlamentano, Edward Zawadzki, direktoro de Ŝtata Blindul-Instituto en Varsovio, kapitano Jan Silhan, prezidento de UABO, kaj Eugenjusz Rytenberg. S-ro dir. Zawadzki disponigis tute senpage al blindaj kongresanoj la domegon kaj internaton de la Instituto. Adreso de la sekretario: Jan Silhan, Lwów, str. prof. Ptaśnika 45.
- 2) TAGE. Dum LA JUBILEA okazos same kongreso de Tutmonda Asocio de Geinstruistoj Esperantistaj. Informas s-ro d-ro Bj. Beckman, Konstapelsgatan 19, Karlskrona, Svedujo.
- 3) TEKA. La prezidanto de TEKA d-ro Wilhelm Róbin direktis al ĉiuj s-anoj medicinistoj alvokon pri tiu kongreso. Estas fondita speciala porkongresa TEKA-sekcio, konsistanta el gravaj kuracistoj kaj profesoroj. Sekretario estas d-ro Mieczysław Zamenhof, Varsovio, str. Senatorska 36.
- 4) KOOPERATIVA. Estas projektata fondo de Internacia Oficejo por kooperativaj problemoj. La Kooperativa Asocio de Polujo akceptis protekton kaj organizon de tiu ĉi kongreso.

Oni klopodas organizi kongresojn de: katolikaj esperantistoj, profesiaj ĵurnalistoj, UDEV k. a. Estraroj de aliaj fakaj Esperanto-organizaĵoj estas insiste petataj interrilati tuj kun nia Sekcio.

**SPORTA.** Gvidanto: Tadeusz Mayzner.

Tiu Sekcio dependas de sufiĉa partopreno de sportantaj samideanoj. Respon-

dis ĝis nun nur Svedoj kaj Rumanoj. La polaj sportaj instancoj promesis ĉiun helpon kaj disponigon de necesaj sportejoj. Estos vizitata la Centra Sport-eduk-Instituto, unu el plej bone aranĝitaj en Eŭropo.

**JUBILEAJ ARANĜOJ KAJ EKSPOZICIO.**

Solenajoj ĉe la tomboj de Majstro kaj Grabowski. Festo de Veteranoj kaj Jubilea Ekspozicio estos aranĝitaj de tiu ĉi Sekcio. Ĉiuj landaj organizaĵoj, grupoj kaj izolaj s-anoj, kiuj posedas interesajn kaj propagandesignifajn ekspoziciaĵojn, bonvolu ilin prunti al ni. Ĉiu sendaĵo estos kvitancita kaj resendita post la Kongreso. La liston de la absendota materialo bonvolu havigi al ni en 3 kopioj.

**KARAVANOJ.**

Estas aranĝataj karavanoj el preskaŭ ĉiuj landoj pere de Landaj Asocioj, turismaj organizaĵoj k. a. Anonciĝis ĝis nun:

- 1) Brita Esperanto-Asocio, adr.: 142 High Holborn, London W. C. 1.
- 2) Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovaka Respubliko, adr. Robert Bloch, Praha-Smichov 106.
- 3) Estona Esperanto-Asocio, adr. Helmi Drezen, poŝtk. 6, Tallinn.
- 4) Societo Franca por la Propagando de Esperanto, adr. 34 rue de Chabrol, Paris X.
- 5) Ges-anoj Borel, Lyon I, 1 Quai Claude Bernard.
- 6) Hungara Esperanto-Federacio, adr.: Sári S. John, Budapeŝt. VI., Vilmos cs. ut 35.
- 7) Itala Esperanto-Centro adr. Galleria V. Emanuele 92, Milano.
- 8) Nederlanda Esperanto-Asocio „La Estonto Estas Nia”, adr.: Linnaeus-parkweg 100, Amsterdam - O.
- 9) Norvega Esperantista Ligo, adr. P. K. 942, Oslo.
- 10) Esperanta Turista Komisiono, Drottninggatan 18, Stockholm.

**HONORA STELO.**

Interkonsente kun Centraj Organizaĵoj Esperantistaj estas projektata de LKK Jubilea Stelo. Ĝi estos dugrada: 1) veterana ora por gesamideanoj, kiuj aliĝis al la movado dum la unua jardeko de



ekzistado de Esperanto: 1887—1896, 2<sup>a</sup> pionira argenta por ges-anoj el la periodo 1897—1912. Regularo kaj detaloj sekvas.

### **GARANTIA FONDO.**

Nia JUBILEA havos pro sia speciala karaktero multajn eksterordinarajn elspezojn. Ni tial turnas nin al vi, estimataj gesamideanoj, kun varma peto aliĝi kiel eble plej baldaŭ kaj laŭpove partopreni en la Garantia Fondo, estanta sub la kontrolo de Pollanda Esperanto-Delegitaro en Kraków. Ĉiu paginto al Garantia Fondo ricevos obligacion, repagotan laŭ bilanco, fermota la 1. 1. 1938.

### **PETO.**

Ni varme petas esperantajn redaktejojn kaj samideanojn alsendadi al ni konstante ĉiujn gazetojn aŭ gazetteltranĉaĵojn, koncernantajn la kongreson mem kaj Polujon.

Por ĉiu korespondaĵo bonvolu aldoni respondkuponon, respektive — enlande — poŝtmarkon.

---

### **AL VARSOVI! AL VARSOVI! JEN LA SOPIR' DE ĈIU EL NI.**

---

### **LA UNUA LISTO DE KONGRESANOJ:**

1. Popper Hugo, komercisto, Böhmisch Kamnitz, ĈSR.
2. Saget Georges, direktoro-hemiisto, Elbeuf (Seine Inf.), Franclando.
3. Justesen Peter Theodor, kuracisto, Fannerup per Kolind, Danlando.
4. Kyfflaenbelt R. W. F., emerita pastro, Utrecht, Nederlando.
5. Malmanche Leopold Adrien, farmaciisto, Rueil-Malmaison, Franclando.
6. Bujwid Odo, profesoro, Kraków, Polujo.
7. Dupuis Marcel Daniel, ingeniero, Paris, Franclando.
8. De Rycke Marguerite, instruistino, Gand, Belgujo.
9. Mason Lewis, Leicester, Anglujo.
10. Bloemendal Sophia Willemina, f-ino, Lochem, Nederlando.
11. Fetterode Johanna Jacoba Maria, f-ino, Lochem, Nederlando.
12. Offerhaus Aleida Gezina, f-ino, Lochem, Nederlando.
13. Petit Pierre, ŝipkonstrua redaktoro, Rosny-sous-Bois, Franclando.
14. Mooij Pieter Hendrik, matematika instruisto, Den Haag, Nederlando.
15. Steiner Hugo, kortega konsilanto, Wien, Aŭstrio.
16. Bloemendal-Wisse Elisabeth, dentkuracistino, Deventer, Nederlando.
17. Bloemendal Arnold, dentkuracisto, Deventer, Nederlando.
18. Holmes Henry W., ŝtatoficisto, London Anglujo.
19. Holmes Nora, s-ino, London, Anglujo.
20. Poly Pierre, fervojisto, Paris, Franclando.
21. Chapellier Jean René, fervoja desegnisto, Auboué, Franclando.
22. Wooding Noel, industriisto, Leicester, Anglujo.
23. Rolondo Giovanni, kanoniko-profesoro, Bari, Italujo.
24. Weinstein Halina, ĵurnalistino, Warszawa, Polujo.
25. Rytenberg Eugenjusz, teknika fabrikvidanto, Warszawa, Polujo.
26. Rytenberg Emilja, dentkuracistino, Warszawa, Polujo.
27. Robin Wilhelm, kuracisto, Warszawa, Polujo.
28. Bloch Robert, ŝtatoficisto, Praha, ĈSR.
29. Lubliner Stefan, redaktoro, Warszawa, Polujo.
30. Belmont Leo, literaturisto kaj advokato, Warszawa, Polujo.
31. Matek Stanisław, ŝtatoficisto, Łódź, Polujo.
32. Ungar Imre, pianludisto, Budapest, Hungarujo.
33. Ungar Ilona, s-ino, Budapest, Hungarujo.
34. Walder Otto, mekanikisto, Bern, Svislando.
35. Hartman Aleksander, urboficisto, Warszawa, Polujo.
36. Wojciechowska Helena, oficistino, Warszawa, Polujo.
37. Bugajski Edward, oficisto, Warszawa, Polujo.
38. Bloch Estera, s-ino, Praha, ĈSR.
39. Kames Jr. G. H., s-ino, s' Gravenhage, Nederlando.
40. Koch Anatol, termezuristo, Łuck, Polujo.
41. Jermolajew Mikołaj, ingeniero, Łuck, Polujo.
42. Beckman Bjarne, gimnazia profesoro, Karlskrona, Svedlando.
43. Cohn Kazimierz, advokato, Warszawa, Polujo.
44. Wyszynski Bronisław Bohdan, direk-

- toro en Kabineto de Trafikministro, Warszawa, Polujo.
45. Sokolowska Stanisława, oficistino, Warszawa, Polujo.
46. Koch Jurko, lernanto, Łuck, Polujo.
47. Zamenhof Leokadja, s-ino, Warszawa, Polujo.
48. Zajączkowski Kazimierz, ministeria konsilanto, Warszawa, Polujo.
49. Czubyński Antoni, gimnazia profesoro, docento de Libera Pola Universitato, Włochy apud Warszawa, Polujo.
50. Szapiro Jakób, ĵurnalisto, Białystok, Polujo.
51. Ender Janina, instruistino, Warszawa, Polujo.
52. Cense Eugenia, instruistino, Warszawa, Polujo.
53. Medrkiewicz Jan, kuracisto, Lublin, Polujo.
54. Loth Emilian, d-ro inĝeniero, Łódź, Polujo.
55. Weinsberg Regina, f-ino, Kraków, Polujo.
56. Sári S. John, f-ino, Budapeŝt, Hungarujo.
57. Zawada Jan, oficisto, Warszawa, Polujo.
58. Agourtine Léon, ĵurnalisto, Paris, Francujo.
59. Mihalik de Hernádszurdok József, profesoro, Budapeŝt, Hungarujo.
60. Jakob Hans, direktoro, Genève, Svislando.
61. Jaraczewski Edmund, oficisto, Warszawa, Polujo.
62. Pikower Anna, dentkuracistino, Warszawa, Polujo.
63. Zamenhof Adam, kuracisto, Warszawa, Polujo.
64. Zamenhof Zofja, kuracistino, Warszawa, Polujo.
65. Zamenhof Wanda, kuracistino, Warszawa, Polujo.
66. Zamenhof Ludwik, lernanto, Warszawa, Polujo.
67. Hermelin-Sztencel Emilia, dentkuracistino, Warszawa, Polujo.
68. Zamenhof Lidja, Lyon, Francujo.
69. Zamenhof Helena, s-ino, Warszawa, Polujo.
70. Klein Karol, d-ro instruisto, Lwów, Polujo.
71. Klein Natalia, instruistino, Lwów, Polujo.
72. Bastien Louis, intendanto-generalo, Paris, Francujo.
73. Kempeneers Paul, kuracisto, Bruxelles, Belgujo.
74. Oliver Arthur Charles, London, Anglujo.
75. Long Bernard, ŝtatoficisto, London, Anglujo.
76. Kamaryt St., profesoro, Bratislava, ĈSR.
77. Goldsmith Cecil Charles, direktoro, Rickmansworth, Anglujo.
78. Goldsmith Eileen, f-ino, Rickmansworth, Anglujo.
79. Blaise Paul, komercisto, Morden, Surrey, Anglujo.
80. Canuto Giorgio, profesoro, kuracisto, Torino, Italujo.
81. Malmgren Ernst, instruisto, Stockholm, Svedlando.
82. Malmgren, s-ino, Stockholm, Svedlando.
83. Rollet de l'Isle, ĉefinĝeniero-hidrografo, Paris, Francujo.
84. Scholze C., profesoro-inĝeniero, Reichenberg-Liberec, ĈSR.
85. Hansen K. Th., farmaciisto, København, Danlando.
86. Couteaux J., kuracisto direktoro de malsanulejoj, Paris, Francujo.
87. Dubois René, komerca direktoro, Paris, Francujo.
88. Azorin Francisko, arkitekto, Madrid, Hispanujo.
89. Dalmau Delfi, profesoro, Barcelona, Hispanujo.
90. Hendriks P., instruisto, Leeuwarden, Nederlando.
91. Bugge-Paulsen R. kapitano, Oslo, Norvegujo.
92. Dahl Einar, instruisto, Uddevalla, Svedlando.
93. Jansson Sam, rektoro, Lidingö, Svedlando.
94. Scherer Joseph, ĵurnalisto, Los Angeles, Usono.
95. Minkow St., profesoro, Sofia, Bulgarujo.
96. Baas P. W., instruisto, Amsterdam C., Nederlando.

**Laŭlanda resumo:** Anglujo 9, Aŭstrio 1, Belgujo 2, Bulgarujo 1, Ĉeĥoslovakujo 5, Danlando 2, Francujo 12, Hispanujo 2, Hungarujo 4, Italujo 2, Nederlando 10, Norvegujo 1, Polujo 37, Svedujo 5, Svislando 2, Usono 1. Entute aliĝis 96 personoj el 16 landoj.

Traleĝu atente niajn Oficialajn Komunikojn N-o 1 kaj 2.

**LOKA KONGRESA KOMITATO.**



## LASTAJ NOVAJOK PRI LA KONGRESO.

Laŭ la sciigo de la ĉeĥoslovaka Fervoja Ministerio ĉiu partoprenonto en la Universala Kongreso en Varsovio profitos 25%-an rabaton sur la ĉeĥoslovakaj fervojoj. La specialajn legitimilojn prizorgas s-ano R. Bloch, Praha — Smichov 106, Ĉeĥoslovakujo.

La Ministerio por Eksterlandaj aferoj de Ĉeĥoslovakujo per dekreto N-o 162-934/V-4/36 de 19. III. 1936 donos senpagaĵajn ĉeĥoslovakajn vizojn por partopre-

nontoj en la Jubilea. La vizojn donos la konsulejoj senpage.

Ĉiu centa aliĝinto al la Kongreso ricevos belan memorajaĵon.

Societoj, samideanoj, dezirantaj ricevi la propagandajn murafiŝojn, tuj skribu al L. K. K. Ankaŭ bv. skribi tiuj, kiuj jam skribis, sed pro iaj kaŭzoj ne ricevis.

Adreso de L. K. K.: Chmielna 26/8, Warszawa I. Polujo.

## BIBLIOGRAFIO

**AXEL MUNTHE: Romano de San Michele. Tradukis el angla lingvo Jenny Weleminsky.** Eldonis Literatura Mondo. Budapeŝt IX. Formato 19,5×13 cm., 506 paĝoj. Prezo ne montrita.

Tiun ĉi libron de la sveda kuracisto akceptis la tutmonda legantaro kun vera entuziasmo. La verko tradukita jam en kelkdekono da kulturaj lingvoj, kreis tutan kritikan literaturon, kio plej bone atestas pri ĝia valoro.

Ĝis la hodiaŭa tago la recenzistoj ne trovis ankoraŭ komunan platformon. sur kiu oni povus unuece fiksi la karakteron de la libro. Plejparte oni klasifikas la verkon kiel „aŭtobiografion“, sed la aŭtoro mem oponas en sia antaŭparolo kontraŭ tiu ĉi opinio. Kaj li estas prava. Legante la libron, oni sentas, ke Axel Munthe tute ne aspiris skribi sian vivhistorion, sed ke liaj travivaĵoj estas nur ŝpinaĵo, el kiu li teksas siajn ideojn kaj konceptojn pri homo kaj lia rilato al la naturo en plej vasta senco.

Kun kora indulgemo li skizas diversajn homajn tipojn, kun kiuj li kontaktiĝis en sia longa vivo, kaj ofte kun granda dozo da humoro li scias prezenti mankojn kaj malperfektaĵojn de siaj proksimuloj. Senindulga li estas nur rilate tiujn siajn samprofesiaĵojn, por kiuj la medicino estas sole profitiga medio, dum laŭ koncepto de la aŭtoro la kuracista profesio „ne estas medio, sed arto“. En la ĉapitro XVII. titolita „Kuracistoj“ diras Axel Munthe, ke profesio de medicinisto „estas sankta ofico, sur sama nivelo, kiel tiu de pastro“. Tiu frazo tiel precize karakterizas la aŭtoron kiel homon kaj kuraciston, ke ĝi faras superflua ĉiujn pluajn vortojn, per kiuj oni volus prilumi tiun flankon de lia personeco. La legado de tiu ĉi mirinda

libro instigas al meditado pri la celo de homa vivo kaj elvokas strangan konvinkon, ke verdire bestoj estas pli bonaj ol homoj. Ĉu ne estas frapantaj tiaj frazoj en la ĉapitro „Pacientoj“: „La hundo estas sanktulo. Ĝi estas sincera kaj honesta denaske“? Leganto, kiu estas best-amiko, sentas profundan kortuŝon, studante la grandiozajn priskribojn de la aŭtoro pri la spirita vivo de la bestoj, ilia karaktero, ilia kunvivado kun homo. Tiuj priskriboj, kiuj vere svarmas en la libro, meritas esti konsiderataj kiel la plej belaj kaj legindaj fragmentoj de la verko.

La lingvo de la traduko estas bona. La tradukintino vere **majstras** **nian** **lingvon**, sed bedaŭrinde ne **estras ĝlan gramatikon**. Tiu manko de ekvilibro inter la stilo kaj la gramatiko kaŭzas centojn da malgustajtoj, eraroj, malgataĵoj, kiuj difektas en ioma grado la plezuron de atentema leganto.

Neeble estas eĉi en konciza racenzo ĉiujn trovitajn malkorektaĵojn, sed mi devas noti almenaŭ le plej oftajn pekojn kontraŭ la gramatiko.

La uzado de la refleksiva propomo „si(n) sia“ estas nekredible konfuza. La refleksiva pronomo estas uzebla nur tiam, kiam subjekto kaj objekto estas identaj. Nun kelkaj ekzemploj de neĝusta uzado de „si“ kaj „sia“ aŭ kontraŭregula neglektado de tiuj formoj.

p. 31. — oni portu lin... al la ŝipo, kiu kunprenu lin al **ŝia** (devas esti **lia**) insulhejmo

p. 39. — „doloroj katenantaj la suferantojn al **ŝiaj** (devas esti **liaj**) litoj...“

p. 62. — Mi povus sanigi la grafionon el **ŝia** (devas esti **ŝia**) kolito...

p. 91. — La grekoj... pentris la harojn de **ŝia** (devas esti **ŝia**) Afrodite...

p. 117. — ...ŝi ŝajne tute ne zorgis pri la subita malsaniĝo de **ŝia** (devas esti **ŝia**) kuzo...

p. 126. — ...ĝi gorgridis kaj metante **ĝian** (devas esti **ŝian**) longan blankan brakon sur mian ŝultron...

p. 178. ...ili ĵus portis, ŝin al **ŝia** (devas esti **ŝia**) ĉelo...

p. 254. ...ili ĵus revenis de longa vojaĝo... en **ŝia** (devas esti **ŝia**) jaĥto...

p. 279. ... Lia sola ripozo de **ŝia** (devas esti **ŝia**) senĉesa laboregado estis muziko.

p. 281. ...Estis io preskaŭ norda en tiu viro, kun **ŝia** (devas esti **ŝia**) rekta, simpla konduto...

p. 288. — Poste, per **ŝiaj** (devas esti **ŝiaj**) grandegaj manoj... li mergus sian tranĉilon.

p. 293 — ...ĉar ...tiuj junaj vestalinoj alportis la girlandon de **ŝia** (devas esti **ŝia**) ĵuneco...

Mi povus citi ankoraŭ dekojn da similaj eraroj, sed mi unuflanke ne volas tedi la legantojn, kaj duaflanke mi devas ankoraŭ tuŝi alispecajn malkorektaĵojn.

Ekzemple tre ofte uzas la tradukintino tute malĝuste nominativon apud akuzativo, kvankam tiu sintakso estas uzehla nur tiam, kiam la nominativo devas havi la sencan de „ke... estas”, „ke... estu” k.t.p.

Jen kelkaj frazoj:

p. 33. — Mi deziras... la kapelon ŝanĝita en kvietn librejo.

p. 61. ...mi trovis lin tie, atendanta min, p. 286. ...La savekspedicio... trovis nin dormantaj profunde sur la planko...

p. 288. ...li mergus, sian tranĉilon... en sian proksiman viktimon, duone konseia pro nesufiĉa narkozo...

p. 312. ...mi neniam renkontis la famajn tri stadiojn... tiel frape montrataj...

Ne mankas ankaŭ frazoj, en kiuj la tradukintino erare uzas nominativon post verbo de movo. Ekz. sur paĝo 59. „Petrucio mem nenion povis preni en la velkintaj manoj”.

Nepardonebla estas la uzado de la prepozicio „per” post pasivo, anstataŭ „de”.

Ekz. sur paĝo 161... „kovrita per pediko”, aŭ sur paĝo 273. „Kuracistoj estu pagataj per la ŝtato”.

Oni trovas en la libro ankaŭ kripligitajn (parte kontraŭfundamentajn) radikojn, k. ekz. morfio (p. 41) anstataŭ



Katalogon petu de la admin. de „Pola Esp.”

morfino, rosario (p. 42) anstataŭ rozario, flarumi (p. 118) anstataŭ ĉirkaŭflari, ŝimpanzo (p. 91) anstataŭ ĉimpanzo, kavaliereco (p. 219) anstataŭ kavaliereco, difterio (p. 498) anstataŭ difterito, kolonado (p. 497) anstataŭ kolonago, sero (p. 361) anstataŭ serumo, monakino (p. 39, 41, 303) anstataŭ monaĥino, kirurgo (p. 47) anstataŭ ĥirurgo k. t. p.

Cetere stranga estas la antipatio de la tradukintino kontraŭ la sono, „h”. Ĉu ŝi volas ĝin eble tute elimini el nia lingvo?

Dum la legado de la libro mi notis ĉian amason da gramatikaj malkorektaĵoj, ke se mi volus ilin ĉiujn preparoli, mi devus skribi specialan disertaĵon: Tamen mi ne povas ankoraŭ preterlasi ĉi tie bedaŭrindan fakton, ke la tradukintino tro ofte tute konfuze uzas la partecipan adverbon.

Sur la paĝo 311, mi trovas jenan frazon: „Li diris, ke li svatos ĵunulino...” Devas esti laŭsence „ke li svatos sin al ĵunulino”, ĉar svati signifas — proponi iun por edziĝo, dum la kunteksto konkludigas, ke la juna homo volas mem edziĝi al la knabino.

Malgraŭ ĉiuj lingvaj mankoj la libro de Axel Munthe devas esti konsiderata kiel unu el la plej gravaj aperaĵoj en nia traduka literaturo. Se en la dua eldono, kies plej baldaŭan aperon mi tute kore deziras al la tradukintino kaj la eldonisto, malaperos lingvaj eraroj, malglatuloj kaj neĝustuloj, la libro fariĝos vera juvelo de esp. literaturo.

Napoleono.



## GVIDLIBRO PRI RIO DE JANEIRO. Eldonis Brazilia Ministerio de Eksterlandaj Aferoj.

Okaze de la IX. Brazilia Esp. Kongreso la Ministerio de Eksterlandaj Aferoj eldonis gvidlibron pri Rio de Janeiro, tiu vere admirinda urbo, kiun oni nomas la plej bela en la mondo. Ke ĝi estas efektive la plej bela, mi povas persone konstati, konante preskaŭ ĉiujn pli grandajn urbojn en Eŭropo. Ne nur la plej bela, sed sekve de siaj aranĝoj unu el la plej kulturaj urboj. Belegaj konstruaĵoj, milda kaj sana klimato, perfektaj aranĝoj el sanitaraj vidpunkto faras la urbon rekomendinda por ĉiu, kiu havante iom da mono kaj tempo, deziras vivi sane, agrable eĉ komforte, ne elspezante multe da mono. Iom da mono neniam malhelpas, sed la vivkostoj en Rio estas malpli altaj ol ie ajn. Turistoj — memoru tion.

Prof. O. Bujwid.

**100 PIKANTAJ PANŜMIRAĴOJ.** Kolektitaj de Dr. M. Topolunsky. Komplegitaj kaj eldonitaj de kuirejstro Franz Ruhn. El germana lingvo tradukis Dre H. Sirk. Formato: 15×12 cm. Paĝoj 42. Eldonita de Ruhn-Verlag, Wien VII. Museumstr. 3. Prezo 1.20 aŭs'r. ŝil.

Fer ĉi tiu libreto nia lingvo je la unua fojo penetras en la kuirejon. La debuto estas sukcesplena, ĉar montriĝas, ke Esperanto tute bone taŭgas por esprimi diversajn „teknikajn terminojn“ uzatajn en la kuirarto. Legante la elprovitajn receptojn, oni sentas, kiel la salivo kunfluas en la buŝo... El alia vidpunkto traktas la libreton mia edzino. Ŝi kalkulas, kiom kostas la preparo de tiu aŭ alia ŝmiraĵo, kiu plaĉas al ŝia gusto, kaj konstatas kun miro, ke ŝmiraĵo farita eĉ laŭ la plej „frande“ impresanta recepto estas efektive malkara manĝaĵo.

La libreton ornamas 14 humoraj ilustraĵoj.

Napo Leono.

**LA VERBO EN ESPERANTO. Teorio kaj praktika uzado.** Verkis Julius Glück kaj J.H.J. Willems. Formato: 15.5×23.5 cm. Paĝoj 47. Eldonita de W. J. Thieme & Cie, Zutphen, Nederlando. Prezo 0.65 gld.

Estas ĝojiga simptomo, ke en la lastaj jaroj aperadas pli kaj pli ofte verkoj pritraktantaj monografie diversajn parolojn de nia gramatiko. Tio signifas, ke al seriozaj esperantistoj ne plu sufiĉas

niaj „universalaj“ gramatikoj, sed ke ili sentas bezonon de specialaj verkoj, kiuj funde kaj multflanke esploras tiun aŭ alian problemon de nia lingvo. Unu el la plej malfacilaj partoj de nia gramatiko estas sendube la verbo. En la daŭron de apenaŭ kelkaj monatoj aperis du monografioj pri la verbo, nome broŝuro de s-ro M. Rollet de l'Isle, kies temo estas pli speciala. („Malsimplaj formoj de la verbo“) kaj la libro, kiu estas objekto de ĉi tiu recenzo, kaj traktas la problemon de la verbo el pli vasta vidpunkto.

Mi estas tre postulema koncerne la nivelon de niaj prilingvaj verkoj, kaj ne ŝatas trograndigadi ilian valoron. Sed rilate la libron de Glück kaj Willems mi ne hontas konfesi, ke mi studis ĝin kun la plej granda plezuro kaj ke mi estas... ravita. La aŭtoroj malkaŝigas kiel majstroj de interpretado kaj evidentigas tian pedagogan talenton, ke studante eĉ la plej malfacilajn partojn de la verko, ni kun surprizo konstatas, ke ĉio estas tiel klara, tiel simpla, tiel facile „digestebla“.

Laŭdinda estas la modesteco de la verkintoj, kiuj en la antaŭparolo akcentas, ke ili intencis skribi sian libron por ĉiu esperantisto. Malgraŭ tiu aserto mi devas konstati, ke kvankam la verketo estas libera de troa teoria balasto, ĝi tamen kontentigos ankaŭ la plej postuleman teoriulon.

N. Apoleono.

**LA JUNA VIVO. Internacia Esperanto-Lernolibro. Verkita de E. Van Veendaal-Bouwes.** Ilustrita de C. Helleman. Paĝoj 32. Eldonita de „La Juna Vivo“, West-Gräfdijk, Nederlando. Prezo 0.15 dol.

La verkistino asertas en la antaŭparolo, ke la lernolibro estas bazita sur la moderna pedagogia principo: Lernado per imitado. Studante la libreton, oni konstatas, ke ĝia enhavo estas bonege adaptita al la principo, kiun al si starigis la verkistino.

La lernolibro estas destinita precipe por infanoj. Ĝi enhavas 15 lecionojn, kies tekstoj farigis laŭgrade pli kaj pli malfacilaj.

Inicindan novajon formas 9 kantoj kun muziknotoj. La ilustraĵoj estas tre klaraj kaj el grafika vidpunkto bonege reproduktitaj.

La lingvo estas modela, vere Zamenhofa Esperanto, kaj pro tio mi kiel ortodoksa „fundamentisto“ legis la verketon

kun granda plezuro. Malgraŭ tre detala esploro mi sukcesis trovi apenaŭ unu ne tro gravan neĝustajon. Nome en la frazo (paĝo 27) „Plej bone estas, ke la gvidanto notas...” preferinda estus la formo „notu”.

**Na Poleono.**

**ESPERANTO-KALENDARO 1937.** Eldonita de **J. Philipp Kruseman**, s' Gravenhage. Nassauplein 1 B. Prezo 1.40 ned. guld + 0.15 guld. sedkonstoj. Formato: 25.5×17 cm.

La kalendaro konsistas el 27 folioj, kiuj per sia supra rando estas alfiksitaj al kartono. Sur ĉiu folio troviĝas ilustraĵo, rilatanta al nia movado. Ekz. bildo de la konata hinda propagandisto Lakshmiwar Sinha — Esperanto-Kurso en la Philips-fabrikeo — portreto de Andreo Cseh — Esperanto-Domo en Arnhem ktp. Komprenible sub ĉiu bildo oni trovas klarigan tekston.

La kvalito de l' papero, bonega reprodukto de la ilustraĵoj kaj zorga presado donas al la kalendaro stampon de luksa eldonaĵo.

**LA LASTA POEMO.** Verkita de **Jaume Grau Casas**. Sant Quinti de Mediona (Barcelona). Formato: 16×11 cm. Paĝoj 27. Prezo unu peselo.

La aŭtoro estas bone konata poeto, kiu verkas ne nur en Esperanto, sed ankaŭ en sia gepatra lingvo. La unua kolekto de liaj versaĵoj aperis ankoraŭ en la jaro 1924 s. t. „Amaj Poemoj”.

La nuna verketo enhavas 15 versaĵojn, el kiuj la lasta laŭvice, estas titolita „La lasta poemo”, kaj ĝi ĝuste donis titolon al tuta kolekto. Ni estu sinceraj — ne ĉiuj poemoj staras sur la sama nivelo. La versaĵoj, al kiuj donis inspiron la familia amseno (kvar sonetoj: al patrino, fratino, edzino, filino) kaj „La lasta poemo”, verkita en decembro 1934 en Barcelona Malliberejo malkaŝas grandan talenton, kaj tuŝas la koron kaj animon de la leganto. Malpli valoraj estas t. n. „okazaĵ” versaĵoj, ĉar mankas al ili stampo de sincera, profunda inspiro.

Kion skribi pri la lingvo? Sufiĉu la konstato, ke la aŭtoro majstre uzas Esperanton kaj donas pruvon, ke oni povas esprimi en nia lingvo la plej delikatajn, la plej subtilajn sentojn, ne bezonante „pliricigadi” la Zamenhofan trezoron per amaso da neologismoj, kiuj svarmas en la verkaro de certa „skolo” en Esperantujo.

**Napol Eono.**

## POLLANDA KRONIKO

**KRAKÓW.** — Sub protekto de la urbestro dro Kaplicki kaj franca konsulo Paul Gesbron-Lavau kaj danke al iniciato de „Société Française pour la Prop. de l' Esperanto” en Parizo okazis la 4-an de februaro k. j. en koncertsalonego „Sala Saska” sukcesplena, solea „Franca Vespero” okaze de en majo okazonta „Internacia Ekspozicio de l' Arto kaj Tekniko” en Parizo.

Antaŭparolis tre interese en franca lingvo prof. Bernard Hamel pri la signifo de la „Internacia Lingvo” por ĉiu kultura homo el sia propra vidpunkto de simpatia impreso, kiu almenaŭ dum mallonga tempo permesas forgesi pri malgajaj temoj, pri milito kaj ĝiaj minacaj konsekvencoj, kaj interparoli kun alilandaj samideanoj pri diversaj interesaj temoj, pritraktantaj la belartojn, mondbelajojn, industrion k.t.p. Ankaŭ li tralegis en franca kaj esperanta lingvoj leteron, invitantan elkore ĉiujn polajn esperantistojn por vizitado de l' Ekspozicio” en Parizo.

Bele prelegis konata ĵurnalistino kaj verkistino sino Alberti pri „La Franco dum ĉiutaga vivo”. La muzikan parton plenumis bela artistia programo. Organizis la vesperon arte kaj sperte ĉiam laborema por esperanta propagando s-ro Henryk Schmittzer.

— Apenaŭ finiĝis la kurso, kiu komenciĝis en decembro de pasinta jaro, kaj jam organizis la loka Societo „Esperanto” novan kurson de nia lingvo. Inaŭguris ĝin publika provleciono, kiu okazis la 15. de februaro k. j. Ĉeestis ĉirkaŭ 150 personoj, el kiuj multaj anoncis sian partoprenon en la kurso, lerte gvidata de dro L. Dreher L. K.

— Danke al cirkulero dissendita de nia Societo al ĉiuj lokaj kultur-sociaj organizadoj, la estraro de la Hejmo de Metiista Junularo invitis la vic-prezidanton de P. E. D. s-ron inĝ. E. Tor, direktoron de Industria Muzeo por prelego pri Esperanto. La prelego okazis dimanĉe la 21. de februaro kaj vekis grandan intereson por nia movado ĉe multenombre kunvenintaj junuloj.



**LÓDZ.** — La 10-an de februaro okazis ĝenerala jarkunveno de Pola Esperanto-Asocio, filio Lodza, dum kiu estis elektita nova estraro, konsistanta el sekvantaj personoj: prezidanto — Franciszek Ender, vicprezidanto — Włodzimierz Pfeiffer, sekretario — Jan Rogoziński, kasisto kaj bibliotekisto — Stanisław Matek, estrarano — Kazimierz Grzelak.

Nemultaj nur scias, ke la prezidanto de nia asocio s-ro Ender, apartenas al la unuaj pioniroj de Esperanto kaj en ĉi-jaro festos ankaŭ la 50-jaran jubileon de sia esperantisteco. Malgraŭ sia aĝo, s-ro Ender elmontras multan interesiĝon por la aferoj de nia asocio, restinte en pasinta jaro ĝia prezidanto.

Gojante havi en niaj vicoj „esperantiston de 1' unua horo” — ni samtem-

pe kun granda bedaŭro anoncas la foriron el Łódź de nia estinta vicprezidanto, s-ro ĉiĝ. Michał Chmieliński, kiu post kelkajara restado en nia pola Manĉestro translokiĝis al Toruń. La Lodza filio de P. E. A. perdas en la persono de s-ro Chmieliński neanstataŭeblan aganton, kies senlacon kaj persiston ni ĉiam testis admirantaj. La foririnton en la nomo de la asocio varme adiaŭis la iama nia prezidanto, s-ro d-ro Emiljan Loth, dezirante al li multan bonon kaj sukceson sur la kampo de nova agado.

Enfine de la kunveno, s-ro Loth vive kaj pentre parolis pri la nuna situacio en Esperantujo, nubigita per la lastaj okazintaĵoj. Lian paroladon, plejparte dediĉitan al UEA kaj IEL, la ĉeestintoj aŭskultis kun plej granda intereso.

## NOVAĴOJ EL ESPERANTUJO

**ANGLUJO.** — La urbaj bibliotekoj en Sheffield, kiuj posedas jam kelkeent esp. librojn, ne nur aĉetis novajn laste aperintajn librojn, sed aranĝis ankoraŭ en la ĉefbiblioteko specialan elmontron de esperantaj libroj.

Nia movado divastigis sukcese inter la tramistoj. Antaŭ unu jaro ekzistis nur izolaj esperantistoj-tramistoj, sed nun estas Esp. grupo kun proksimume 200 anoj. La grupo vekis tiom da intereso, ke la nova ĉefdirektoro de tramoj petis la grupestron viziti lin por preparoli la eventualan oficialigon de la instruado de Esperanto. Jam nun la tramistoj ricevis permeson porti la verdan stelan dum la deĵoro.

**AŬSTRIO.** — La urbestro de Vieno, ĉefurbo de Aŭstrio, per cirkulero dissendita en oktobro 1936 alvokis la estrarojn de ĉiuj fakaj metiistaj lernejoj kaj la estraron de la ĝenerala metia pliperfekta lernejo en Vieno, ke ili informu la lernantaron pri la ideo kaj celo de la lingvo Esperanto kaj instigu ĝin al partopreno en kursoj de tiu lingvo.

**FINNLANDO.** — En decembro 1936 j. Esp. Societo de Finnaj Fervojistoj faris proponon al la administracio de la finnaj ŝtatafervojoj pri enkonduko de nia lingvo en la planatajn ligvokursojn por la fervojistoj. En la motivita dokumento la societo aludis al facileco kaj neŭtraleco de nia lingvo. Ĝi estas multfoje pli facile ellernbla ol la angla aŭ germana lingvoj, pri

kio atestas miloj da memlernintoj en ĉiuj landoj. Ke indas lerni Esperanton, pri tio denove atestas la varma subteno de kelkaj fervojaj administracioj, pluraj komercaj ĉambroj, internaciaj foiroj, gravaj radiostacioj, universitatoj ktp. Poste la societo prezentis ekzemplojn pri subteno de kelkaj aliaj fervojaj administracioj kaj denombriis la staciojn, en kiuj oni tuj povus ekiustri Esperanton. La nombro estas 11 stacioj, la plej gravaj en Finnlando.

**HISpanujo.** — La gazeto „Popola Fronto”, eldonata de Grupo Laborista Esperantista en Valencia komunikas, ke s-ro Julio Mangada, kiu kiel oficiro de hispana registara armeo komandis kolonon de milicanoj, estis sur la batakkampo elektita ĝeneralo. S-ro Mangada estas tre fervora esperantisto, kiu partoprenis en multaj Universalaj Esp. Kongresoj kaj malkaŝis ankaŭ konsiderindan literaturan talenton kiel verkinto de kelkaj originalaj verkoj en Esperanto.

**HUNGARUJO.** — En oktobro 1936 la gazetaro de la tuta mondo komunikis, ke en la internacia roman-konkurso, kiun aranĝis la agentejo Pinker en Londono kune kun 14 grandaj libro-eldonejoj, la premio de 4.000 funtoj sterlingaj (ĉirkaŭ 100.000 zloty) gajnis la hungara verkistino s-ino Jolan Földes per sia romano titolita „La strato de fiskaptanta kato”. S-ro Vilhelmo Bleier, la eldonan-

to de „Literatura Mondo” en Budapeŝto, vizitis la feliĉan verkistinon por paroli, kun ŝi pri Esperanto. Dum la intervjuo s-ino Földes malkaŝis, ke ŝi ne nur alte taksas kaj ŝatas Esperanton, sed eĉ bone komprenas ĝin, ĉar kiel universitata studentino ŝi tralegis tutan lernolibron de Esperanto kaj poste pro veto sen vortaro tradukis unu tatan Esperanto-lingvan novelon en hungaran lingvon.

**ITALUJO.** — La ĝenerala direkcio por turismo, fako de la itala Ministerio de Gazetaro kaj Propagando, elskribis konkurson inter radio-aŭskultantoj de „Italaj Turismaj Kronikoj” por la lingvoj franca, angla, germana, nederlanda kaj por Esperanto. La premioj konsistas en kvin unuaklasaj ir-revenaj biletoj de landlimo ĝis Napoli, plus po 10 hotel-kuponoj, kaj kvin duaklasaj biletoj landlimo-Romo, plus po 10 hotel-kuponoj.

**JAPANUJO.** — En Japanujo fondiĝis Esp. Sciencista Asocio, kies adreso en-havas la nomojn de pli ol 450 japanaj sciencistoj, scipovantaj Esperanton, inter ili eminentaj profesoroj kaj lektoroj de universitatoj, direktoroj de hospitaloj, radio-stacio, astronomia observejo k.t.p. La Asocio eldonas propran organon „Scienco”.

**KATALUNUJO.** — Inter la lingvoj, uzataj de la oficiala propaganda oficejo de la „Generalitat de Catalunya” por informi la eksterlandan gazetaron pri la okazaĵoj en Hispanujo, troviĝas ankaŭ Esperanto. La nomita oficejo eldonas specialan informilon en Esperanto.

**EL KIOTO, NOV-JORKO, LONDONO,  
PARIZO  
VARSOVION VENOS AMIK' KUN VALIZO**

## KOMUNIKO.

Internacia Esperanto-Ligo komunikas al siaj anoj kaj aligemuloj en Pollando, ke ĝia ĉefdelegito por Polujo estas **inĝ. Michał Chmieliński, Toruń, ul. Kraślńskiego — Wydział Dróg Wodnych.** Aligintoj — ĝis nun nepagintaj sian kotizon — bonvolu sendi ĝin al la ĉefdelegito. Ĉe malsendoj kaj informpetoj bonvolu aldoni konvenan afrankon por respondo aŭ kvitanĉresendo.

## ALVOKO AL KUNLABORADO.

La Redakcio petas insiste:

a) literaturemajn legantojn pri kunlaborado per regula alsendado de originalaj kaj tradukitaj literaturajoj,

b) propagandistojn pri verkado de artikoloj koncernantaj la problemojn de esperantista movado,

c) estrarojn de societoj apartenantaj al P. E. D. pri regula sendado de raportoj kaj koncizaj notoj pri la agado de siaj grupoj. La enhavo de la komunikajoj estu vere esenca. Oni evitu trodon, panegirajojn, personajn reklamojn k. s.

Se vi deziras, ke „Pola Esperantisto” estu interesa legaĵo por ĉiuj kaj inde reprezentu la landon de la Jubilea Kongreso, provizu ĝin per leginda materialo!

Kin sendos al mi unu aŭ du respondokuponojn por la poŝtelspezoj, ricevos s e n p a g e bonajn Esperantajn librojn.

**Profesoro Schramm, Tübingen,  
Waldhäuserstrasse 34.**

## UWAGA!

Wszelkie wpłaty abonamentu miesięcznika „Pola Esperantisto” skutecznie można na konto PKO Nr. 406.660 lub przekazem rozrachunkowym, kartoteka Nr. 20, co zaoszczędzi wpłacającym koszty przesyłki.

PRENUMERATA: rocznie zł. 8.—, półrocznie zł. 4.— Dla Towarzystw i grup esper. rocznie zł. 6.— Zagranicą: 5 fr. szw. Numer pojedynczy zł. 0.70, podwójny zł. 1.40.

OGŁOSZENIA: 1/2 strony zł. 30.— 1/4 strony zł. 15.— 1/8 strony zł. 10.— Korespondencja: małe ogłosz. z 10 słów (prócz adresu) zł. 1.—

PRZEKAZ ROZRACHUNKOWY, KARTOTEKA NR. 20.

ABONO: jare zł. 8.—, duojare zł. 4.— Por societoj kaj grupoj esperantistaj jare zł. 6.— Eksterlande 5 sv. fr. Aparta numero zł. 0.70 duobla zł. 1.40.

ANONCOJ: 1/2 paĝo zł. 30.— 1/4 paĝo zł. 15.— 1/8 paĝo zł. 10.— Korespondado: anonceto de 10 vortoj (krom adreso) zł. 1.—

KONTO P. K. O. NR. 406.660.

REDAKCJO KAJ ADMINISTRACIO: KRAKOW. L UBICZ 34.